
# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (930) • 2018 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Martin Luther King – profeto kaj martiro | 51 |
| Martin Luther King daŭre inspiras | 53 |
| Du virinaj portretoj | 56 |
| Invito al sankteco – Patrino Tereza | 58 |
| La naskiĝo de demokratio – kelkaj datenoj | 59 |
| Studo montras kiel Dio aspektas | 60 |
| Komparo de paroloj – ĉu hejma kulturo influas parolantojn? | 62 |
| Tagordo por la jarkunveno 2018 | 63 |
| Financaj raportoj kaj klarigoj | 64 |
| Bajabongo – muzika sceneto | 68 |
| Informetoj | 70 |
| Sac. Lajos Kóbor – nekrologo | 71 |
| Irlanda beno | 72 |

# Redaktoraj vortoj

Ĉi-foje ne multe da materialo venis por enmeti en nian gazeton. Vi rimarkos ke pluraj artikoloj estas republikigoj kaj tradukoj el novaĵprogramoj. Tamen tiuj, kaj kion mi samtempe legis kaj legas pri la politika situacio en Eŭropo kaj aliloke, formas por mi ian tuton. Mi timas.

Kiam mi (re)legas kion Martin Luther King kaj aliuloj faris pro siaj konvikoj kaj revoj formi socion egalan por ĉiuj, mi iom hontas ke mi ne estas pli agema por defendi kio jam estas atingita. La plej multaj el ni povas mem atesti pri tio, kio okazis dum la pasintaj 50 jaroj. Eble ni nun perdis nian forton, ni ne estas same agemaj kiel en 1968, ni ankaŭ perdis multajn inspirajn homojn kiuj gvidis nin. Sed ni ne rajtas ripozi ankoraŭ, ni devas batali kiel kristano kaj kiel esperantisto por socio egala kaj demokrata por ĉiuj.

Ni komencu kune kaj ekumene labori!

Antaŭ 50 jaroj

# Martin Luther King

## Profeto kaj martiro

Stefan Maul,

Publikigita en Espero Katolika 5/1968

En aprilo oni memorigis nin ke en 1968 la pastoro Martin Luther King estis murdita en Usono. En la numero 5/1968 de Espero Katolika Stefan Maul skribis la jenan tekston. Liaj pensoj prezentataj en la artikolo estas validaj ankaŭ hodiaŭ, post 50 jaroj. Kaj ni ne forgesu la revon de Martin Luther King!

La apuda poemo estis publikigita en la sama numero de Espero Katolika. /Redaktoro

Kompari lin kun John F Kennedy, Mahatma Ghandi aŭ eĉ Kristo – kiu ne trovas ĉi tiun ideon akceptinda? D-ro Martin Luther King estis murdita kìel ili, li pledis por justeco kiel ili, li estis prudenta kiel ili, li donis esperon kiel ili, li profetis kiel ili, li batalis sen perforto kiel ili, li estis tamen energia kiel ili – nun li devis morti kiel ili, ŝajne sen iu senco. Sed kiel ili ankaŭ li nun estas martiro, simbolo de la venko en la malvenko. Tiel rigardite, lia morto havas sencon, minimume tiun, same brutale veki la mondan konsciencon, kiel brutale oni murdis lin.



Publika bildo, nekonata fotisto, Vikipedio

Oni murdis lin? Jes, oni - aŭ pli ĝuste ni diru: ni.

Ni, ĉar ni ne sufiĉe amis;
ni, ĉar ni ne sufiĉe helpis;
ni, ĉar ni nur bele parolis pri justeco,
egaleco, homaj rajtoj.

La murdiĝo de pac-apostolo kaj batalanto por la homaj rajtoj (dum la Internacia Jaro de la Homaj Rajtoj) abrupte kaj draste montras nian situacion: la mondo malsanas, tre malsanas.

La patro de d-ro King diris post la murdo: “Nun mi ekkonas, kiel malsana estas ĉi tiu lando”. Ne nur via lando, kompatinda patro, kiu instruis al via filo la neperforton! Via afero estas ankaŭ nia! La afero de via filo estis la nia - nur

bedaŭrinde ni ne kunbatalis, ne kunpreĝis, ne kunagis, ne kunhelpis.

Pardonu nin, Martin Luther King, pardonu ke ni nur dekoris vin per Nobel-premio sed ne agis por la paco; pardonu, ke ni laŭdis vin, sed ne mallaŭdis nin, kiuj ĉiutage agas same kiel ili, kiujn vi volis ŝanĝi, eduki, plibonigi, al kiuj vi predikis la evangelion de Kristo, la evangelion de justeco, amo, paco; pardonu ke ni murdis vin per nia komfortemo, per nia malintereso, per nia sen-ameco, per nia dormado.

La mondo, ni perdis grandan esperon. Sed vi mem, via espero, via morto eĉ esperigas nin, ĉar ni kredas vian profetan vizion: "Baldaŭ ni estos en la laŭdata lando!". Tiel vi diris mallonge antaŭ via martiriĝo. Ni promesas al vi fari ĉion, por ke via popolo, niaj fratoj, vere baldaŭ atingu la laŭdatan landon, kiun vi - kiel Moseo - ne plu rajtis eniri; sed vidi ĝin vi jam povis. Ni promesas al vi, ke via profetaĵo plenumiĝos - alie ni devus malesperi pri ni mem, devus lamenti, devus plori. Ni venĝos vian murdon - ne per aliaj murdoj, kiel faras aŭ intencas viaj torturitaj fratoj en sia senmezura malĝojo - sed per agoj de l' paco, ĉi tie kaj ĉie sur ĉi tiu senpaca mondo.

La murdpafo igis plori miajn okulojn, sed tralarme mi vidis novan esperon, kiu ĝermas el la spirito kaj konscienca heredaĵo de bonkora kaj di-plaĉa homo.

*Stefan Maul*

www.esperokatolika.org/ek19661970/ek1968_05.htm

NE MALAMI

Ne lasu min malami, Sinjoro.
Senkompate
la mondo
inter la radoj
dismuelas mian pacon,
ankoraŭ dumdorme ĉasas min,
sufokas la sonĝojn,
elblovas la lumojn de mia interno.

Ne lasu min malami, Sinjoro.
Tra malhelo verdaj
serpentoj
ĉirkaŭsiblas,
ĉirkaŭvolvas min.

Mi emas ami,
volonte,
tiel volonte ami.
Helpu min, Dio, bruligi
la angore flagrantan
flamon de la ĉefaltaro,
ke ĝi heligu
la terure nigran nokton
de la mondo.

*Georgia Douglas Johnson*
(el "Afriko kantas")

# Martin Luther King daŭre inspiras – 50 jarojn poste

Mohamed Said
El sveda novaĵprogramo
Tradukis Bengt Olof Åradsson

Kvindek jarojn post la morto de Martin Luther King, batalanto por civilaj rajtoj, lia mesaĝo pri homa egalvaloro estas pli aktuala ol iam ajn. King estas viva fonto de inspiro por aktivuloj en la *Never Again*-movado [Neniam plu] kaj *Black Lives Matter* [Nigraj vivoj gravas]

- Li montris la vojon, diras Gloria Ray Karlmark, kiu en 1957 mem batalis kontraŭ rasismo kiel lernantino en Arkansaso.

Kiam Martin Luther King sur hotela balkono en Memphis, Tenesio, estis pafita en la kapo, li planis gigantan proteston kontraŭ ekonomiaj mal-justecoj en Vaŝingtono, nomita *Poor People's Campaign* [Kampanjo de malriĉuloj].

Ĉi tiun semajnon, lia nepo, Yolanda Renee King, naŭjara, parolis ĉe alia mastodonto-manifestacio en la usona ĉefurbo: *March For Our Lives* [Marŝo por niaj vivoj]. Tie temis pri pli sekuraj lernejoj kaj pli severaj leĝoj pri armiloj.

- Mia avo havis sonĝon, ke liaj kvar nepoj ne estu juĝataj laŭ sia haŭta koloro, sed laŭ tio kiuj ili estas, ŝi diris aludante al la fama “Mi havas sonĝon”-parolo de King.

- Mi havas sonĝon – ke sufiĉas nun, – ke ni ricevas mondon sen armiloj.

## En la vico

Gloria Ray Karlmark, kiu vivas en Svedio jam dum multaj jaroj, diras ke Martin Luther King havis alvokon. Kiel 14-jaraĝa, kiam ŝi kaj ok aliaj nigraj gelernantoj komencis blankan lernejon en Little Rock, Arkansaso, ŝi aŭdis pri King kaj Rosa Parks. La rifuzo de Parks rezigni pri sia seĝo en buso por blanka viro fariĝis la komenco de la tiel nomata busbojkoto en Alabamo en 1955, grava mejloŝtono por la civila rajto-movado.

- Ni sciis, ke ni estis en la vico. La lernejo integriĝus, ŝi memoras kaj iomete kirlas sian teon. Kaj mi estis juna kaj plena de sonĝoj. Mi volis esti nuklea fizikisto.

La supera kortumo de Usono en 1954 decidis, ke rasa apartigo en la landaj lernejoj estis nekongrua kun la Konstitucio kaj en Little Rock plano por integriĝo estis preparita. Gloria

Ray Karlmark kaj ŝiaj amikoj, nomitaj *Little Rock Nine* – havis bonajn stud-atestojn kaj povis enskribiĝi en la iaman tute blankulan lernejon.

## Sendis elitajn soldatojn

Sed ekzistis fortoj en la socio, kiuj rifuzis akcepti la juĝodecidon de la supera kortumo. La guberniestro de Arkansaso, Orval Faubus, sendis la Nacian gvardion al Little Rock Central High School por bari la nigrajn lernantojn eniri. Ray Karlmark rakontas realisme pri la seniluziiĝo, la timo kaj la blankaj linĉ-grupoj. Nur post ŝia patro skribis al la prezidento Dwight D Eisenhower kaj la prezidento sendis elitajn soldatojn por eskorti la lernantojn en la lernejon la edukado fariĝis realaĵo.

Kiam la unua el la grupo *Little Rock Nine*, Ernest Green, diplomiĝis, Ray Karlmark renkontiĝis kun Martin Luther King ĉe la akcepta festo.

- Li estis viro kun karismo, persono kiun oni aŭskultas. Por mi, lia ĉefa mesaĝo estis, ke ĉiuj homoj havas egalan gravecon, sendepende de haŭta koloro, sekso aŭ kredo. Tio estas bezonata en la hodiaŭa Usono, kiu estas tre dividita.

Kiel vi eksciis, ke Martin Luther King estis murdita?

- Mi aŭdis tion, kiam mi laboris kiel matematikisto en Chicago [Ĉikago]. Mi memoras ke mi iris hejmen, tenante mian spiron kaj esperis, ke tio ne estas vera.

## Neperforta fluo

Sed veris. En 1968, unu sola pafo haltigis




King ĉe porcivilrajta marŝo ĉe Vaŝingtono. Fotis Rowland Scherman (trovita en Vikipedio)

la vivon de Martin Luther King kaj lian vivotaskon. Gloria Ray Karlmark diras, ke la murdo memorigis ŝin pri tio, kiom danĝera estas ŝia ekzisto kiel nigrulo – sed estis ankaŭ instigo daŭrigi la batalon por civilaj rajtoj. Kaj Ray Karlmark, kies avo estis sklavo en Missouri [Misuri], diplomiĝis kaj en matematiko kaj en kemio, edziniĝis al sveda viro, fariĝis patenta inĝeniero kaj redaktisto, kaj en 1999 ŝi ricevis la oran medalon de la kongreso.

De Svedujo, ŝi nun sekvas la evoluon en sia malnova patrujo.

- Mi spertis 50 jarojn da progreso kiel virino, kiel nigrulo kaj en la edukado. Sed tamen restas multe por fari, tiom lerni de Doktoro King, diras Ray Karlmark.

## La murdo en Memphis, Tenesio

Je tri okazoj en 1968, King vizitis Memphis, Tenesio. Je la unua okazo li parolis apogante strikantajn laboristojn

de sanitara servo. Je la dua li vidis, kiam priparolita marŝo finiĝis en tumulto. La trian kaj lastan fojon li forlasis Memphis en ĉerko.

La 4-an de aprilo 1968, Martin Luther King Jr. estis mortpafita en ĉambro 306 de la *Lorraine Motel*. La murdo de King kaŭzis koleregon inter multaj afriko-usonanoj. Por kelkaj ĝi signifis finon al la ne-perforta metodo. Por aliaj, tamen estis grave resti ĉe la devizo de King kaj prezenti malkontentecon, sen turni al perforto.

Fonto: https://www.svt.se/nyheter/utrikes/martin-luther-king-inspirerar-annu

## Martin Luther King sumige en 5 punktoj

- Naskiĝis en 1929 en Atlanta, Georgio. Studis sociologion ĉe Morehouse College and Theology ĉe Crozer Theological Seminary. Pastoriĝis en Alabamo 25 jara. La sekvan jaron, 1955, li doktoriĝis en teologio ĉe Boston University.
- Edziĝis en 1953 al Coretta Scott en ŝia hejma urbo Heiberger, Alabamo. La paro havis kvar infanojn. En 1957 li iĝis la unua prezidanto de la civila-rajto-movado Southern Christian Leadership Conferences (SCLC).
- Li direktis kampanjon en 1955 kontraŭ la apartigo en busoj, tio estas, ke la nigraj vojaĝantoj devis sidi en specialaj lokoj en la busoj. Li batalis kontraŭ apartigo kaj rasismo en Georgio kaj organizis atentigajn protestojn en Birmingham, Alabamo en 1963. Tiun saman jaron li organizis grandan marŝadon en Vaŝingtono, dum kiu li tenis sian faman "Mi havas songôn" paroladon. King ankaŭ partoprenis en la historiaj marŝoj inter Montgomery kaj Alabamo por la voĉdonrajtoj de nigraj civitanoj.
- Martin Luther King rekomendis ne-perforton. Li ricevis la Nobel-Pacan Premion en 1964. Je la fino de sia vivo li pridubis la partoprenon de Usono en la Vjetnama Milito kaj parolis pri politikaj aliancoj inter ĉiuj – sendepende de haŭta koloro.
- Estis murdita en Memphis, Tenesio, la 4an de aprilo 1968. King vojaĝis tien por apogi strikantajn sanitarajn laboristojn, sed estis mortpafita sur la balkono de sia hotelo. La eskapita malliberulo James Earl Ray estis kondamnita pro la murdo al 99 jaroj en malliberejo, sed hodiaŭ, konspiraj teorioj pri la murdo daŭre ekzistas.

# Du virinaj portretoj –
## lige kun Martin Luther King

Jacques Tuinder, NL
(1933–2011)
Publikigita en Dia Regno n-ro 3/2006

### Coretta King

Ŝi restis fidela al senperforteco...

La 31-an de januaro mortis en Usono Coretta King (1927–2006). Kune kun sia en 1968 mortigita edzo Martin Luther ŝi ludis gravan rolon en la batalo por samaj civitanaj rajtoj kaj kunvivado pli justa kaj paca. Apopleksio kaj koratako, okazintaj en aŭgusto 2005, forte plimalbonigis ŝian sanstaton. De el kliniko en Meksikio, kie ŝi restadis la lastan tempon, ŝi meze de januaro ankoraŭ faris surprizan viziton al la Atlanta M.L.King Centro, kiun ŝi estis fondinta. Sidante rulseĝe ŝi afable kaj ridetante ĉirkaŭrigardis, sed ne plu kapablis paroli. La ĉeestintoj spontane regalis ŝin per ovacio staranta!

Coretta ekkreskis en Perry County (Alabamo), kie ŝia patro estris kamparanan butikon, benzinstacion kaj transportentreprenon. Ŝiaj forto kaj decidemo jam junaĝe evidentiĝis. Ŝi estis la dua nigra studentino en la historio kiu vizitis la Ohian Kolegion; la fratino ŝin antaŭis. Danke al stipendio eblis al ŝi ekstudi en konservatorio. Tie ŝi ekkonis junan pastoron, kiu studis filozofion kaj poste fariĝis ŝia edzo.



Coretta King apud portreto de sia edzo en la White House 2004.

La 18-an de junio 1953 okazis la nupto-ceremonio. Ili reiris por unu jaro al Bostono por fini la studadon. Poste ili ekloĝis en Montgomero, kie Martin komencis pastori en baptista komunumo. Novembre 1955 naskiĝis la unua infano, Jolanda Denise.

La aŭtobusbojkoto sekve de la aresto de Rosa Parks, kiun organizis la nigraj gvidantoj en Atlanto, faris Martin en aĝo 27-jara unu el la unuaj kaj ĉefaj protestintoj. Akompane de Coretta, lin ade subtenanta, li fariĝis la fama senperforta batalanto por civitanaj rajtoj por la nigra enloĝantaro en Usono. “Mi estas konvinkita pri tio, ke se mi ne

havintus tiom fortan, senŝancelan kaj trankvilan edzinon, mi neniam povintus elteni la streĉojn kaj afliktojn kiujn ofte postulis la movado," li poste skribis.

Post la morto de la edzo je la 4-a de aprilo 1968 tri temoj ludis centran rolon en ŝia vivo: la zorgo pri la kvar infanoj, la starigo de Kontraŭperforta Centro por daŭrigi lian laboron kaj la okazigo de ĉiujara rememoriga tago. Daŭris tamen pli ol dek jarojn antaŭ ol prezidento Ronald Reagan fine de 1983 subskribis la leĝon, kiu ebligis ekde 1986 ĉiujare je la tria lundo de januaro celebri Tagon Rememoran pri Martin Luther King.

Karakterizis la gvidantinecon de Coretta neelĉerpeblaj ĉarmo, gajeco kaj decidemo. Estas konate, ke ŝia pensado pri senperforteco estis daŭra kaj konsekvenca. Eĉ meze de akraj konfliktoj ŝi restis inda kaj afabla. Ŝi ĉion kompetente kaj profunde pripensis.

En 1994 ŝi transdonis la gvidadon de la King Centro al sia filo Dexter (1961), kies frato Martin III (1957) parte transprenis tiun taskon en 2004.

La filino Jolanda (1955) fariĝis aktorino kaj la alia filino, Bernice (1963), preferis la profesion de sia patro kaj plenumis pastoran funkcion. Tute laŭ la spirito de la edzo Coretta ade kaj ade emfazis, ke la plej profunda kaŭzo de la mizero en la mondo estas la triobla malbono de rasismo, malriĉo kaj perforto. Pri la laboro de la Asocio de Repaciĝo ŝi diris, ke estas la kuraĝa sindediĉo al la liberigo de la homaro de ĉi tiuj malbonoj kiu avangardigis la senperfortan batalon por paco kaj justeco. Dum la lastaj vivojaroj ŝi klare kaj kulpige protestis kontraŭ film- kaj televido-kompanioj, videobutikoj, armil-industrio kaj fabrikistoj de perfortaj infanludiloj. Simile al Martin Luther, Coretta Scott King estis homo kun revo. Plej dece oni ŝin honoru alproksimigante la vizion de Paca Kunvivado, por kiu ŝia edzo mortis kaj ŝi mem batalis, ke tiu revo ne perdiĝu!

— ★ —

## Rosa Parks

### Ni neniam forgesu ŝin!

Kiu ne konas ŝian nomon? Rosa Parks (1913–2005), la usona aktivistino sur la kampo de porcivitanaj rajtoj? Ŝi estis la virino, kiu motoris la pezan kaj komplikan batalon por samaj homrajtoj favore al la nigra enloĝantaro de Usono.



Rosa Parks kun M L KIng en 1955.

La 1-an de decembro 1955 ŝi rifuzis

forlasi sian sidlokon en la ankoraŭ malplena mezparto de aŭtobuso en Montgomero, kiam blankulo volis eksidi ĝuste tien. La leĝo en la ŝtato Alabamo diktis, ke en tia kazo la nigraj pasaĝeroj prenu lokon en la busmalantaŭo aŭ simple ekstaru.

Rosa Parks, kiu jam dum jaroj uzis tiun buslinion de el la urbocentro – kie ŝi laboris kiel kudristino en grandvendejo - estis laca kaj suferis je doloraj piedoj. Tiun tagon ŝi ne volis ŝanĝi sian sidlokon. Oni vokis la policon, kiu postulis punpagon de dek dolaroj. Kiam ŝi decidis ne pagi ĝin, oni arestis ŝin.

Sekvis, kompreneble, proceso. La gvidantoj de la nigra komunumo en la urbo, kiuj konis Rosa Parks, ĉar ŝi jam kelkajn jarojn aktivis kadre de movado por civitanaj rajtoj en Montgomero, alvokis al aŭtobusbojkoto proteste kontraŭ tiu formo de rasodiskriminacio.

Amase la nigra enloĝantaro rifuzis ekde tiam uzi la busojn. Tiu agado daŭris tutan jaron kaj preskaŭ rezultigis la bankroton de la busentrepreno. Dume la proceso kontraŭ Rosa Parks alvenis ĉe la Usona Supera Tribunalo.

Ĝi pravigis ŝin, klarigante la apartigon inter blankuloj kaj nigruloj kontraŭkonstitucia. Komence de la sesdekaj jaroj Rosa Parks transloĝiĝis al Detrojto, kie ŝi restadis ĝis sia morto. En la jaro 2004 evidentiĝis el medicina raporto ke ŝi ekdemencas. Jaron poste, la 24-an de oktobro 2005, ŝi mortis en la dormo je 92-jara aĝo. Kiel unua virino en la historio de Usono ŝian korpon oni katafalkis en la Kapitolo; granda honoro kiu kutime fariĝas nur al prezidentoj kaj militherooj.

La 2-an de novembro 2005 okazis rememoriga ceremonio, dum kiu parolis inter aliaj ankaŭ eksprezidento Bill Clinton. ☙

## Invito al sankteco

### Patrino Tereza

tradukis Antonio De Salvo

*Homo estas neracia, egocentra: ne gravas, amu lin!*

*Se vi bonfaras, oni atribuos al vi egoismajn kaŝitajn celojn: ne gravas, bonfaru!*

*Se vi realigas viajn celojn vi trovos malverajn amikojn kaj verajn malamikojn: ne gravas, realigu ilin!*

*La bono kiun vi faras estos morgaŭ forgesita: ne gravas, bonfaru!*

*Honesteco kaj sincereco igas vin iamaniere vundebla: ne gravas, estu ĉiam kaj ĉiel sincera kaj honesta!*

*Tio kion vi konstruis dum jaroj povas esti detruata en unu momento: ne gravas, konstruu!*

*Se vi helpas la homojn, ili ofendiĝos: ne gravas, helpu ilin!*

*Donu al la mondo la plejbonon el vi kaj oni piedfrapos vin: ne gravas, daŭrigu!*

# La naskiĝo de demokratio — kelkaj datenoj

Ĉerpoj plejparte el Vikipedio

En antikva Helenio demokratio ekis en Ateno en jaro 508 a.Kr, kiam Klisteno lanĉis la tielnomitan "Atenan eksperimenton", li havis kontraŭ si la riĉulojn, kiuj provis ricevi helpon de ekstera regno, t. e. Sparto. La atena sistemo, prosperinte, iĝis modelo, kaj estis imitata de multaj aliaj inter la helenaj urbo-regnoj.

En Romio, longa historio de klas-bataloj kondukis al kompleksa respublika sistemo, kiu neniam estis vere demokrata.

Ĉe ĝermanaj popoloj pluraj institucioj estis antaŭformoj de demokratio, eĉ pli demokrataj ol tiuj de Grekio, kiuj valoris nur por la civitanoj (ĝenerale nur 10% de la loĝantoj), malinkluzivante ĉiujn virinojn, la alilandanojn kaj la multajn sklavojn)

Kiel la komencon de moderna demokratio oni povas nomi la enkondukon de ĝenerala kaj egala balotrajto. En multaj landoj la viroj ricevis balotrajton fine de la 19-a jarcento. La regantaj pensmanieroj ne konsideris ebla, ke la virinoj partoprenu en politiko (ili estis forbaritaj eĉ el supera edukado). Pri vere egala balotrajto oni povas paroli nur kiam ankaŭ la virinoj ricevis la rajton voĉdoni. En multaj landoj tio okazis post la jaro 1900.

En la suba tabelo vi trovas ekzemplojn de landoj kiam la balotrajto estis enkondukita por viroj respektive virinoj.

Por viroj

| | | | |
|---|---|---|---|
| Francio: | 1792 | Norvegio: | 1893 |
| Grekio: | 1844 | Austrio: | 1896 |
| Svislando: | 1848 | Ĉeĥio: | 1896 |
| Danlando: | 1849 | Finnlando: | 1906 |
| Usono: | 1870 | Svedio: | 1909 |
| Germanio | 1871 | Rusio: | 1917 |
| Nov Zelando: | 1879 | Britio: | 1918 |
| Serbio: | 1888 | Hungario | 1945 |


Por virinoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| Nov Zelando: | 1893 | Svedio: | 1919 |
| Finnlando: | 1906 | Usono: | 1920 |
| Norvegio: | 1913 | Britio: | 1928 |
| Danlando: | 1915 | Francio: | 1945 |
| Rusio: | 1917 | Hungario: | 1945 |
| Austrio: | 1918 | Serbio: | 1945 |
| Ĉeĥio: | 1918 | Grekio: | 1952 |
| Germanio: | 1919 | Svislando: | 1990 |

# Studo montras kiel Dio aspektas

https://www.svt.se/kultur/studie-visar-hur-vi-tror-att-gud-ser-ut

Kiel ni vere imagas Dion? Kutime tre simila al ni mem, tion nova studo ĉe usona universitato montras.




Studo ĉe la Universitato de Norda Karolino montras, ke politiko ludas gravan rolon kiel ni imagas Dion. La studo petis 511 kristanajn usonanojn eltrovi kian vizaĝon inter 300, kiuj, laŭ ilia persona percepto, similas al Dio. La sekva paŝo en la procezo estis, ke komputilo fandis denove la elektitajn vizaĝojn por plua elekto.

La rezultoj montras, ke politiko, sekso, klaso kaj aĝo estas ĉiuj decidaj faktoroj, kiuj influas kiel ni imagas Dion. La komuna trajto ŝajnas esti egocentra – ni elektas tiun bildon de Dio, kiu plej similas al nia propra spegula bildo.


## Politikaj diferencoj

Laŭ la esploristoj malantaŭ la projekto, la rezulto estas bildo pli amika kaj pli atingebla ol la klasika bildo de Dio pentrita de Michelangelo. Ne troviĝis blanka barbo videbla en la vizaĝo. La rimarkeblaj diferencoj en la fine elektitaj vizaĝoj en la studo estis ke la politike konservativaj emis elekti vizaĝojn kiuj prezentis Dion kiel pli maljuna, pli riĉa, kun pli da viraj trajtoj kaj radiis potencon, dum la partoprenantaj demokratoj emis elekti bildon



de Dio estante pli juna, pli ina kaj kun ameca elradio, kaj kun iom pli da afroamerika aspekto.

Laŭ la esploristoj malantaŭ la studo, ĉi tiu diferenco kuŝas en la antaŭjuĝoj kiuj baziĝas sur la diversaj politikaj opinioj.




### La egocentro ludas rolon

Krom la politika vidpunkto, la egocentra faktoro estas grava. La partoprenantoj en la studo ŝatus vidi Dion kiel spegulan bildon de si mem. Ekzemple, pli maljunaj partoprenantoj opiniis, ke Dio estis pli aĝa. Allogaj kaj ĉarmaj partoprenantoj, opiniis ke ankaŭ Dio estis alloga. Ĉi tio kun nur unu escepto – kaj virinoj kaj viroj vidis Dion kiel viron.

La studo estis publikigita la 11-an de junio en la usona esplorpaĝo PLoS One kun la titolo The faces of God in America: Revealing religious diversity across people and politics [La vizaĝoj de Dio en Usono: malkaŝante religiajn diversecojn inter homoj kaj politiko.

Vidu:
http://journals.plos.org/plosone/article?id=10.1371/journal.pone.0198745.

La supra eltiro estas traduko de la sveda novaĵpaĝo SVT Nyheter.

---

# Laste alvenis

Julia Sigmond eldonis fabelan libreton ĉe la eldonejo Exit, nome *Steĉjo- Fabeloj*. Jam en Dia Regno 1/2018 ŝi anoncis la aperon de la libro kaj mallonge priskribis ĝin.

Ĝi enhavas 12 mallongajn "fabelojn" aŭ ĉapitrojn, kiuj formas pli/malpli unu historion ĉirkaŭ Steĉjo. Entute 67 facile legeblaj ĉarmaj paĝoj, kun ilustraĵoj.

Ĉu anakronismo – ĉar kvankam okazis antaŭ "multaj-multaj jaroj" la infanoj "babilis ... per skajpo"? Bedaŭra preseraro okazis ĉe la nomo Inga Johansson kiu en sekva paĝo iĝis Inge Johansson, sed tio ne grave influas la tutecan bildon pri la libreto, kiun mi trovas esti taŭga libro precipe por tiuj, kiuj volas ion simplan legi por praktiki kaj reteni sian lingvoscion.




*Bengt Olof Åradsson*

# Komparo de paroloj –
## ĉu hejma kulturo influas parolantojn

Resumo de diplomlaboraĵo

Bengt Olof Åradsson, SE

Ivo Lapenna, en sia libro Retoriko, skribas ke "Ekzistas homoj, kiuj havas naturan talenton konvinke kaj trafe paroli" kaj ke elokventeco estas bazo de la parolarto. La scienca studo, la *retoriko*, havas longan tradicion en la okcidentaj landoj. Originante el la antikva tempo, dum la pasintaj jarcentoj ĝi estis instruata en universitatoj kaj lernejoj kaj havis fortan influon tra la socio. En Ĉinio kaj Japanio la tradicioj estas aliaj. Pluraj esploristoj atestas pri observeblaj diferencoj, en la manieroj verki tekstojn, ĉe gestudentoj de diversaj kulturoj. La hejman kulturon la verkistoj aŭ parolantoj kunportas en siajn tekstojn kaj parolojn kaj tiuj diferencoj povas krei miskomprenon kiam ili venas al ne-hejma kultura cirkonstanco.

Certe ankaŭ en Esperantion esperantistoj kunportas siajn hejmajn kulturajn influojn. Ĉu tiu influo ankaŭ estas observebla aŭ iom subkonscie sentebla? Ĉu tiaj diferencoj, se ekzistas, ankaŭ influas la aŭskultantojn en la pritakso de la prelegantoj, ĉar la aŭskultantoj simile prijuĝas la parolojn tra sia kultura filtro. Interesa sekva demando povus esti, ĉu tio ankaŭ influas la movadon, ekz. ĉe elektoj de gvidantoj?

La fina diplomlaboraĵo lige al miaj studoj en Poznano provis esplori ĉu ekzistas tiaj diferencoj ĉe esperantistaj prelegantoj de diversaj kulturaj tradicioj. La studobjektoj estis elektitaj inter la prelegoj faritaj dum la 3-a Nitobe-simpozio en la kadro de la Universala Kongreso en 2004, kiu okazis en Pekino. La selektitaj paroloj estis prezentataj en Esperanto kaj la prelegantoj venantaj el kaj okcidento kaj oriento. La elirpunkto per kiu la prelegoj estis studataj estas la retoriko laŭ la greko-romia tradicio.

La malgranda studo trovis kelkajn interesajn diferencojn, tamen ne sufiĉajn por konfirmi kun certeco la trovaĵojn faritajn de multaj esploristoj.

Kelkaj trovaĵoj, kiuj eble montras kulturajn diferencojn:

- uzado de la pronomoj Ni/Mi montris diferencojn kaj plej forte ĉe la ĉina parolanto
- nur la okcidentulo instigis pli rekte al agado, kiam la azianoj pli neklare aludis al pli supraj decidopovaj fortoj, eĉ Dio.
- la okcident-edukitoj uzis je 30 % pli longajn frazojn.

Kvankam la malsukceso en la studo pruvi la tezon, certe la hejma kulturo troviĝas ankaŭ ĉe esperantistoj en iliaj parol- kaj skribmanieroj. Kaj ankaŭ ĉe ni aŭskultantoj/legantoj! Ĉu ni povas eviti ke tio estu obstaklo kiam ni pro paroloj aŭ skribado pritaksas homojn el alia kulturo? ☙

# Tagordo por la jarkunveno de KELI 2018

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Akcepto de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Diskuto kaj akcepto de la raportoj
10 Buĝetoj
11 Raporto de la redaktoro
12 Estrarelekto
13 Kongresplanoj – 2019
14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
15 Fermo

**Klarigoj:**

*(12) Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Bengt Olof Åradsson kaj Zoltan Somhegyi. Bengt Olof Åradsson estas reelektebla.*

*(13) Propono ke la KELI-kongreso 2019 okazu en Hungario*

---

# A l i ĝ i n t o j

al 22-a Ekumena Esperanto Kongreso 2018,
Poděbrady, Ĉeĥio

Daŭrigo

72. Stuppnig Martin, Aŭstrio
73. Cavazzana Patricia, Italio
74. Partacini Claudio, Italio
75. Kirsch Veronika, Hungario
76. Citavá Alžběta, Ĉeĥio
77. Cayzac Hanna, Francio
78. Pesti Antal, Hungario

## Financa raporto de KELI 2017 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2016 | 2017 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | | | |
| | Stoko de libroj | 4.925,03 | 4.925,03 |
| | Stoko de kasedoj, E-Misio | 116,00 | 116,00 |
| | *Provizo* | *5.041,03* | *5.041,03* |
| | Kasista kaso | 0,00 | 50,00 |
| | Sekretaria kaso | 2.487,00 | 1.688,00 |
| | UEA-konto kelk-p | 7.180,95 | 23.713,30 |
| | Ĝir-konto, CIC-banko | 933,35 | 933,22 |
| | Ŝpar-konto, CIC -banko | 31.761,67 | 29.414,69 |
| | CE bank-konto | 0,00 | 196,80 |
| | *Monrimedoj* | *42.362,97* | *55.996,01* |
| | **Sumo de aktivoj** | **47.404,00** | **61.037,04** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 21.670,57 | 21.073,86 |
| | Rezulto de la jaro | **-596,71** | **-1.481,90** |
| | *Kapitalo entute* | *21.073,86* | *19.591,96* |
| | Dumvivaj membroj | 2.122,50 | 2.004,50 |
| | E-Misio | 6.894,51 | 6.894,51 |
| | Helpa kaso | 1.850,08 | 1.850,08 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.823,48 | 1.823,48 |
| | Literatura/Himnara kaso | 12.941,57 | 12.941,57 |
| | Heredaĵo de Pamela Jackson | 0,00 | 11.161,44 |
| | Mondonaco de K.U.N.E. | 0,00 | 4.000,00 |
| | *Fondusoj entute* | *25.632,14* | *40.675,58* |
| | Kreditoroj (finna kaj brita kaso) | 0,00 | 0,00 |
| | Evidente | 633,00 | 457,00 |
| | KELI-abonoj de EK | 25,00 | 12,50 |
| | Kongresaj kotizoj | 40,00 | 300,00 |
| | *Transitaĵoj kaj pasivoj* | *698,00* | *769,50* |
| | **Sumo de pasivoj** | **47.404,00** | **61.037,04** |

# Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2017.12.31

## Aktivoj

### Stokoj

En la jaro 2017 ne ŝanĝiĝis la stoko de libroj aŭ kasedoj.
Nova inventuro kaj donacado al malriĉaj, nepagipovaj landoj estas decidita.

### Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU), kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický (CZ), kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.
KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe franca CIC-banko (ĝir- kaj ŝparkonto) kaj provizore ni havas bankkonton ĉe la franca CE-banko, kies fermado estas decidita. KELI tamen ne ŝanĝos bankon, kiel ni planis, ĉar ĉe CIC-banko ni ricevis pli bonajn kondiĉojn.

## Pasivoj

### Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. La rezulto de la jaro 2017 estis bedaŭrinde negativa: -1.481,90 Eŭroj.

### Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj. En 2017 KELI ricevis heredaĵon (11.161,44 Eŭrojn) de sinjorino Pamela Jackson, la vidvino de iama brita KELI-ano Mervyn Jackson.
Decidis la finon de la funkciado la nederlanda sekcio de KELI (KUNE), kaj ili mondonacis al nia ligo 4.000 Eŭrojn. La nederlandaj membroj pagos siajn kotizojn rekte al unu el KELI kontoj.

### Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2017, kiel en ĉiuj jaroj, KELI-anoj kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen.
KELI-anoj mendas la gazeton Espero Katolika tra la konto de kelk-p, tiu ĉi sumo jam estas transkontigita al IKUE.
La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ- kaj kongreskotizoj, kiuj alvenis rekte al la bankkonto de KELI kaj estos ĝiritaj al LKK.

## Rezulto 2017 kaj buĝetoj 2017, 2018 kaj 2019 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2017 | Rezulto 2017 | Buĝeto 2018 | Buĝeto 2019 |
|---|---|---|---|---|
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.000 | 2.103,00 | 2.000 | 2.000 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | 0 | 0,00 | 0 | 0 |
| Adopta Kaso | 400 | 122,31 | 400 | 400 |
| *Kotizoj entute* | *2.400* | *2.225,31* | *2.400* | *2.400* |
| Librovendado | 50 | 75,80 | 50 | 50 |
| Rentumoj | 250 | 260,85 | 250 | 250 |
| Profito el kongreso | 200 | 0,00 | 200 | 200 |
| *Aliaj enspezoj* | *500* | *336,65* | *500* | *500* |
| **Enspezoj entute** | **2.900** | **2.561,96** | **2.900** | **2.900** |
| **Elspezoj** | | | | |
| Presado kaj sendado de DR | 2.600 | 2.876,00 | 2.600 | 2.600 |
| Perantoj | 0 | 0,00 | 0 | 0 |
| *Revuokostoj* | *2.600* | *2.876,00* | *2.600* | *2.600* |
| Prezidanto | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| Sekretario | 70 | 70,00 | 70 | 70 |
| Redaktoro | 150 | 150,00 | 150 | 150 |
| Kasisto/Matrikulisto | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| *Estrarkostoj* | *260* | *260,00* | *260* | *260* |
| UEA-kotizo | 65 | 64,00 | 65 | 65 |
| Bankkostoj | 250 | 219,66 | 250 | 250 |
| Merituloj | 50 | 0,00 | 50 | 50 |
| UK Lukostoj | 50 | 70,00 | 50 | 50 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *415* | *353,66* | *415* | *415* |
| Librovendado (kostoj) | 10 | 0,00 | 10 | 10 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 10 | 0,00 | 10 | 10 |
| Malprofito de la kongreso | 0 | 550,00 | 0 | 0 |
| Rabatoj de perantoj | 5 | 4,20 | 5 | 5 |
| *Aliaj elspezoj* | *25* | *554,20* | *25* | *25* |
| **Elspezoj entute** | **3.300** | **4.043,86** | **3.300** | **3.300** |
| **Saldoj** | **-400** | **-1.481,90** | **-400** | **-400** |

# Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2017 kaj la Buĝetoj 2018/2019

## Enspezoj

### Kotizoj

La kotizoj en 2017 estis malpli ol planitaj. Bedaŭrinde ankaŭ al la Adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis, kvankam pli ol en la antaŭa jaro. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui "laŭforte". Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

### Aliaj enspezoj

Kaj la librovendado kaj la rentumoj estis pli altaj en la jaro 2017, ol ni planis. Malofte okazas, sed bedaŭrinde nia pasintjara kongreso havis malprofiton.

## Elspezoj

### Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

### Estrarkostoj

En 2017 la kostoj estis la planitaj sumoj.

### Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2017 estis la UEA-kotizoj kaj la bankkostoj kaj la luado de salono dum 101-a kaj 102-a UK.

### Aliaj elspezoj

Bedaŭrinde la kongreso en Zöblitz havis malpli da partoprenantoj ol la LKK planis, kaj pro tio la kongreso havis malprofiton.

## Saldoj

La saldo de la jaro 2017 estis bedaŭrinde negativa: - 1.481,90 eŭroj. La malaltiĝo de la sumo de la kotizoj kaj la Adopta kaso jam antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis, nia membraro maljuniĝas. Pro tio ni presas kaj dissendas malpli da Dia Regno-gazetoj, tiel ankaŭ la kostojn ni sukcesis malaltigi.
Dank' al la grandaj mondonaco kaj heredaĵo la financa bazo de KELI tamen daŭre estas kontentiga.

## Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2018 kaj 2019 estas eble iom optimismaj, sed ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon, kaj ankaŭ partoprenos la somerajn kongresojn.
Ni tamen pro la sekureco planas modestan negativan rezulton al la sekvontaj du jaroj.

# BAJABONGO

**Sceneto por voĉo kaj piano / piano sola**

teksto: Petro Hertlingo
traduko: Rikardo Ŝulco
muziko: Franz-Georg Rössler (1985/2008)




12
vin bas - ku - las, mi - a fi - lo. Vi - an vi - von en tran - kvi - lo
Mi - an ŝul - tron vi - a pe - zo fro - te vun - das. Jen la pre - zo!
14
kan - tas ĝi - a sil - ka bant'.
Sed mi es - tas. Ba - ja bong'.
(la voĉo paŭzas)
16
18
22
kantovoĉo:
mp
Ba-ja-bong', ba-ja-bong', ba-ja-bong', ba-ja-bong', ba-ja-bong', ba-ja-bong', ba-ja-bong'.
p
ritardando

# Informoj

## Opero en Esperanto sur la ĉeĥa nacia scenejo



Plurloke surrete troveblas la informo ke en Ĉeĥio oni prezentis teatraĵon en Esperanto.

Okazis en la ĉeĥa Nacia Teatro en Prago la 7-an de aprilo 2018. Tiam la opero "La suferoj de la princo Sternenhoch" havis premieron. La teatraĵo estis prezentita plene en Esperanto. La aŭtoro de la teksto deziris, ke la teksto estu en ne tro konata lingvo simila al la itala.

Pli da informo vi i.a. trovas sur la retpaĝo de Libera Folio:
http://www.liberafolio.org/2018/04/10/opero-en-esperanto-sur-la-ceha-nacia-scenejo/

---

## Rob Moerbeek ricevis reĝan ordenon



En aprilo 2018, dum la malferma tago de UEA, la veterano Rob Moerbeek estis honorigita per la reĝa Ordeno de Oranje-Nassau (simile Jacques Tuinder en 1998). Inter alie li ricevis la ordenon pro sia sindediĉa agado favore al blinduloj kaj malfortevidantoj.

Ni gratulas la honoriton.

Pli da informo vi trovas ĉe Edukado.net:
https://edukado.net/novajhoj?id=742

Vidu filmon pri la okazaĵo en Youtube:
https://www.youtube.com/watch?v=2viNCD2snwg

/Redaktoro



# Sac. Lajos Kóbor
# 4.9.1932–29.4.2018



Post longa malsano, la 29-an de aprilo 2018 mortis sac. Lajos Kóbor. Kiel paroĥestro li dum pluraj jaroj servis en la vilaĝo Pereszteg. En la jaro 2011 li celebris 50 jarojn de sacerdotiĝo.

En IKUE li membris plurajn jarojn. Ekde la jaro 1979 li estis la reprezentanto de IKUE en Hungario.

Ankaŭ dum pluraj jaroj li estis estrarano de IKUE. Li servis kiel la vicprezidanto de IKUE, kaj respondeculo pri ekumena agado kaj eldonado.

Ĉe la fondkunsido de IKUEJ (1996) li estis elektita la animzorganto de la junulara sekcio.

Li ankaŭ membris en la Liturgia komisiono starigita laŭ la invito de la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto por revizii la liturgiajn tekstojn en Esperanto.

Li partoprenis plurajn IKUE-kongresojn, kaj la lasta, kiun li partoprenis, estis en la jaro 2012 en Pecs.

Same li partoprenis plurajn E-aranĝojn, dum kiuj li celebris la Sanktan meson (Universalaj kongresoj, tendaroj en Ĉehio) kaj same kungvidis la ekumenajn diservojn.

Rememoru lin en la preĝoj.

La eternan vivon donu al li Sinjoro, li ripozu en la paco.

Marija Belošević,
vicprezidantino de IKUE

Lin ligis multaj fadenoj al la fervojista grupo kaj esperantistoj en Győr: li vizitis nian klubejon, instruis, entuziasmigis, festparoladis en Zamenhof-festoj, donacis librojn al la klubo, kaj nia kontakto ne interrompiĝis ankaŭ post tio, ke li emeritiĝis kaj transloĝiĝis en la pastran maljunulhejmon en Sopron.

Ni profunde kunsentas la funebron de lia familio.

Jozefo Horvath

# Irlanda beno

## Irische Segenswünsche

### Möge die Straße uns zusammenführen

Kunligu la strato nin per bona vento
kiu ŝovu nian dorson nur
pluvo falu milde sur la kampojn
vian kapon trafu varma sun'

*Refreno*:
Kaj ĝis la revido nia, Dio tenu vin per sia man'
Kaj ĝis la revido nia, Dio tenu vin per sia man'

Gvidu la strato, kiun vi prenas
ĉiam valen nur al via cel'
kaj se malvarmas, havu varmajn pensojn
kaj la plenan lunon en la nokt'

*Refreno*

Kapkuseno estu ĉiam mola
vesto, pano manku ne por vi
kvardek jarojn estu en ĉielo
nemortinta pensu la Satan'

*Refreno*

Kaj ĝis la revido nia
esperas mi ke Dio ŝirmas vin
li tenu vin en siaj manoj
sed ne tro forta estu lia prem'

*Refreno*

IRLANDA BENO • M: Markus Phytlik,
E: Klaus Friese 2017 • Gotteslob Köln 823